AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ

Accademia Internazionale delle Scienze

Internationale Akademie der Wissenschaften

International Academy of Sciences

SAN-MARINO

Académie Internationale des Sciences

PROVA SANMARINECA UNIVERSITATA STUDADSESIO en BOSNIO KAJ HERCEGOVINO

PSUS BA

Banjaluko / Бања Лука (BA)

2008-08-31 / 09-06

(1707/1708 pfR)

Sanmarinesische Universitäre Probe-Studientagung

Sessione Universitaria Sammarinese Pilota

Pilot Sanmarinian University Session

Séance-Pilote Universitaire Sanmarinienne

Пилот универзитетска студентска сесија АИС, Сан Марино
Pilot univerzitetska studentska sesija AIS, San Marino

Laborlingvoj · lingue di lavoro · Arbeitssprachen · working languages · langues de travail
la Internacia Lingvo (ILo) · italiano · Deutsch · English · français
Bosanski jezik · Hrvatski jezik · Српски језик

Enhavo

1 Oficialaĵoj . . . 2
2 Kursoj kaj prelegoj . . . 3
2.1 Sciencaj kursoj . . . 3
2.2 Liberaj, docentiĝaj kaj debutaj prelegoj (konferenca programo) . . . 4
3 Kandidataj finekzamenoj . . . 4
4 Sekci-kunsidoj . . . 5
5 Kadra programo kun ekskurso . . . 5
6 Organizaj detaloj . . . 5
6.1 Kursoj kaj kursfinaj ekzamenetoj . . . 5
6.2 Prelegoj . . . 6
6.3 Sekretariejo . . . 6
6.4 Aliĝo . . . 6
6.5 Mono . . . 7
6.6 Salonoj . . . 7
7 Instruteko . . . 8
8 Pri Banjaluko . . . 9
8.1 Situo kaj sciindaĵoj . . . 9
8.2 Retaj informoj . . . 11
Programtabelo . . . 12

Programo de la Bosnia-Hercegovina Prov-SUS

La Bosnia-Hercegovina Prov-SUS de AIS okazas en Banjaluko (BA) en la Universitata Centro, adreso: Bulevar Vojvode Petra Bojovića 1a. La enirejo al la universitata centro estas vid-al-vide de strato *Aleja Svetog Save* (Ⓔ en la mapeto sur paĝo 9). Ĉe la enirejo estas skribaj informoj pri la SUS-ejo, dumtempe ankaŭ akceptanto, kiu parolas ILon.

La tempoj indikitaj en tiu ĉi eldono estas ankoraŭ provizoraj kaj povas ŝanĝiĝi. Bonvolu atenti informojn afiŝitajn de la SUS-sekretariejo.

La inaŭgura salono *Boulanger* estas la Festsalono de la Akademio de la Artoj, en la rektoreja konstruaĵo Ⓡ de la universitato. Kursoj kaj prelegoj okazas en la domo de la fakultato pri sporto Ⓚ.

1 Oficialaĵoj

dato	tempo	evento	salono
08-31 dim	10:00–11:00	senatkunsido (nepublika)	Descartes
	11:00–12:00	ekzamenofico (nepublika)	Descartes
	16:00–17:00	asembleo de la Subtena Sektoro	Descartes
	17:00–18:00	inaŭguro de la Prov-SUS	Boulanger
09-02 mar	20:00–20:30	sekcikunsidoj 1–6	sekcisalonoj
09-03 mer	20:00–21:30	forumo pri akad. rekomendoj	
09-05 ven	16:00–17:00	membrokunveno de AIS Germanio	
09-05 ven	17:00–18:00	ĝenerala asembleo de SciS	
09-06 sab	9:00–16:00	studfinaj ekzamenoj	
	anoncota	fermo de la Prov-SUS	

2 Kursoj kaj prelegoj

2.1 Sciencaj kursoj

La sekvaj kursoj – valoraj po unu stud-unuon (stu) – okazas ekde lundo ĝis ĵaŭdo (09-01/09-04), ĉiutage je la sama tempo, en blokoj nomataj A/B/C/D[1]. La longa paŭzo tagmeza nomiĝas M. La kursestroj kaj kursanoj povas interkonsenti pri paŭzo dum la blokoj kaj kompensa plilongigo. Bonvolu atenti, ke ĵaŭde posttagmeze okazas ekskurso; pro tio kelkaj kurs-lecionoj okazas vendrede matene.

	A	B	M	C	D
tempo	9:00–10:30	11:00–12:30	12:30–14:00	14:00–15:30	16:00–17:30

Sekcio 1: Kibernetiko

`K1` OProf. Dr. Reinhard Fössmeier

Enkonduko al la mastruma sistemo Linukso (bloko C, kun escepto)

Linukso estas komputila mastruma sistemo, kiu taŭgas por diversgrandaj serviloj, sed ankaŭ por personaj komputiloj. Tiurilate ĝi estas preskaŭ la sola rivalo al Vindozo. La kurso skizas la historian evoluon, la karakterizajn trajtojn kaj la bazon de la uzado.

Sekcio 5: Natursciencoj

`N1` OProf. Hans Dietrich Quednau dr.

Geografia informprilaborado per la libera GIS-programo „GRASS“ kaj la GIS-rilata GUI „QGIS“ (bloko B)

La geografia informprilaborado okupiĝas pri la prilaborado de datenoj, kiuj havas rilaton al la tera surfaco (spac-rilataj datenoj). GIS (= Geografia Inform-Sistemo) signifas origine la ensemblon konsistantan el tiaspecaj datenoj kaj komputilo kaj programoj por prilabori ilin. Hodiaŭ tamen oni komprenas per la nocio GIS precipe la softan parton de tiu ensemblo. Per GIS-programo oni povas spac-rilatajn datenojn registri, analizi kaj grafike prezenti. En la kurso ni uzos la plej konatan senkostan kaj liberfontan GIS-programon „GRASS“ kune kun la ankaŭ senkosta kaj liberfonta vidiga kaj interfaca programo „QGIS“.

Sekcio 6: Morfosciencoj

`M1` EProf. ADoc. Mag. Alicja Lewanderska-Quednau

Teknikoj kaj metodoj de mensa laboro kaj ergonomiaj mezuroj de fizikaj kaj de psikaj pen-elspezoj (bloko C, kun escepto)

La kurso temas pri
– lernado, memlernado, studado, preparado al ekzamenoj kaj manieroj de skribado de bakalaŭraj kaj magistraj verkoj (ekz. ĉe AIS)
– la diferencoj inter teknikoj kaj metodoj dum mensa laboro, percepteblo, psikaj procezoj i.a. procezoj afekciaj kaj volaj.
– Plifortigo, trejnado kaj mezurado de konigaj procezoj. (tipoj de ili : atento, rimarko, perceptado, asociado, imago, memoro kaj pensado)
– Helpo kaj malhelpo de motivigoj kaj volaj procezoj.
– Rolo de ergonomio en mensa (psika) aktiveco – kun prezentado de mezurado kaj efikoj de mezuresploroj (EEG, Ergonometro) – laŭ la Munkena (Oberhaching) kaj Nurenberga Ergonomia Instituto kompare kun polaj institutoj.
– Ankaŭ estas priparolata la metodo, kiun oni uzas en Centra Minista Instituto en Katowice kaj en la Ĉefa Instituto pri Unua Helpo en Polica kaj Fajrobrigada Altlernejoj.
– la rolo de personeco kaj temperamento dum studado (kapabloj, karaktero, inteligento). Al tio koncernas la teorio de H. Frank pri inteligento. Ankaŭ laŭ la teorio de H. Frank oni povas dedukti, kiamaniere oni uzu ĝin praktike ekz. dum ekzamenoj kaj skribado de studfinaj verkoj.
– socia rolo de individuo en evoluo de personeco – precipe en nuna periodo en kaj por komuna Eŭropo.

[1] Por eviti miskomprenojn ni ne uzas la literon Ĉ por marki blokon.

M2 EProf. ADoc. Dr. Ljubiša Preradović
Informadika modelado (bloko A)

La procedo de projektado de informadika sistemo estas speco de modelado de la reala sistemo. Por tio necesas intelektaj rimedoj, kaj ili estas:
– Modelo de datenoj (objektoj de la sistemo, iliaj ecoj kaj reciprokaj rilatoj),
– Modelo de proceso (dinamiko de la sistemo, efiko de eniro al stato de la sistemo kaj eliraj transformoj).
– Modelo de datenoj estas matematika abstraktaĵo, kiun oni utiligas por projektado de modelo de la reala mondo. Nocio kaj intenco de ilaro por Perkomputile Subtenata Softvara Inĝenieriko. Praktika ellaborado.

M3 EProf. ADoc. Mag. Boĵidar Leonov
Bazaj principoj de la religia turismo. (bloko A, kun escepto)

2.2 Liberaj, docentiĝaj kaj debutaj prelegoj (konferenca programo)

Liberaj kaj projekt-akceptigaj prelegoj okazas en la sekciaj salonoj, sub la gvido de la dekanoj aŭ de iliaj komisiitoj.

Docentiĝ- kaj debut-prelegojn laŭeble enkondukas dekano aŭ reprezentanto de la senato.

K-p1 EProf. Sara Konnerth
Modelo de studadplano. (Mardo, bloko D, 16.40; probable virtuale, tra reto.)

K-p2 OProf. Dr. habil. Eva Poláková
Etiko en amaskomunikado. (Vendredo, bloko B, 12:00)

H-p1 Zlatko Hinšt dr. sc., dipl. oec., prof
Lingvaj eksplikoj kaj proponoj pri financaj terminoj. (Mardo, bloko D, 17:20)

F-p1 ADoc. Dr. E. Macko
La diferenco inter dialektiko kaj dialogiko (Vendredo, bloko B, 11.00)

M-p1 EProf. Dr. Lj. Preradović, Mićo Vrhovac inĝ.
Turismaj potencialoj de Respubliko Serba (Mardo, bloko D, 16.00)

3 Kandidataj finekzamenoj

La finekzamenoj por kandidatoj, kiuj celas originale aŭ per adapta adopto akiri ĉe AIS la agnoskon de akademia nivelo (bakalaŭreco, magistreco, doktoreco aŭ habilit-doktoreco), okazas je vendredo (09-05) kaj/aŭ sabato (09-06), laŭ surloke afiŝota horaro.

La kandidatprelegoj estas publikaj, kaj ĉiuj PSUS-anoj estas bonvenaj ĉeesti la prelegojn de la kandidatoj kaj la postajn diskutojn. Parolaj fakekzamenoj (nepublikaj) kaj skribaj ekzamenoj (se necesaj) okazas laŭ horaro afiŝota de la Ekzamenofico.

Kandidatoj, pri kies dokumentoj estas iuj duboj, bonvolu jam antaŭ SUS interkonsenti kun la ekzamen-ofico pri la procedo por klarigi la dubojn. Ne okazas publikaj konsult-horoj.

Kandidatoj el reform-eŭropaj kaj kompareblaj landoj havas dum la PSUS 75-%-an rabaton je siaj ekzamen-kotizoj.

Por eviti problemojn bv. rekontroli, ĉu ĉiuj viaj ekzamen-dokumentoj jam troviĝas ĉe la Ekzamenofico!

La Ekzamenoficon por la jaroj 2008–2011 elektos la senato komence de SUS

Ĉiu kandidato antaŭ sia finekzameniĝo nepre devas esti enskribiĝinta al minimume du (2) sciencaj SUS-kursoj (se li ne jam havas la bezonatajn kurs-atestojn). Inter la du kursoj unu devas esti en la sekcio, en kiu okazas la kandidatiĝo, unu devas esti el alia sekcio. Entute estas bezonataj kvar (4) atestitaj kursaj studunuoj; nur por adapta adopto sufiĉas, laŭ la novaj regularoj, la du SUS-kursoj.

La Ekzamenofico atentigas kandidatojn, ke prezentiĝo al la fina ekzameno sen antaŭa regularkonforma kompletigo kaj disponigo de ĉiuj necesaj dokumentoj al la Ekzamenofico povas kaŭzi aŭ **malakcepton** de la kandidatiĝo aŭ **postulon de krompago** superanta la normalan ekzamenkotizon pro la kroma laboro.

4 Sekci-kunsidoj

Ekde la 1-a de januaro deĵoras nova senato. Tial sekcioj, kiuj ankoraŭ ne faris tion, devas elekti sian estraron (dekano, vic-dekano, fakarestroj).

En la sekci-kunsidoj ĉiuj efektivaj membroj (OProf., AProf., PDoc.) havas parol- kaj voĉrajton. PDoc. estas elektebla kiel fakarestro, AProf. krome kiel vic-dekano, OProf. krome kiel dekando. Asociitaj docento (ADoc.) havas la rajton voĉdoni, kiam ne temas pri elektoj, alvokoj kaj rangoaltigoj. En la fakar-kunsidoj ili havas senrestriktan voĉdonrajton. Pri detaloj komparu la regularon pri Rajtoj, Devoj kaj Alvokoj (RD).

5 Kadra programo kun ekskurso

Lunde, post kursbloko C, okazos komuna rigardado de urbo Banjaluko, kun loka ĉiĉerono, inĝ. Mićo Vrhovac. Oni ekiros ĉe la enirejo Ⓔ de la universitato.

Je mardo en bloko D okazos rond-tabla diskuto pri la „procezo de Bolonjo“ por unuecigo de la universitata edukado. Partoprenos reprezentantoj de la universitato de Banjaluko kaj de AIS. Ankoraŭ ne estas decidite, ĉu tiu diskuto estos publika.

Ĵaŭde posttagmeze okazos **ekskurso** per buso al *Krupa na Vrbasu* (Крупа на Врбасу) sude de Banjaluko. Tie videblas mezepokaj monaĥejo kaj urbokerno kaj la profunda kanjono de rivero Vrbas. Interesuloj povos partopreni boatan river-veturon.

Verŝajne okazos prezentado de nova libro „Elektitaj lecionoj pri historio de scienco kaj tekniko“, kiun preparas EProf. Preradović.

Inter kaj post la programeroj eblas manĝi kaj kunsidi en restoracio „Libera Menso“ *(Slobodni Um / Слободни Ум)* Ⓜ proksime de la rektorejo. Ĝi estas malferma de la 8-a al la 20-a horoj.

Laŭtradicie AIS invitas ĉiujn SUS-anojn al la partopreno en la **Akademia Forumo** kun publika diskuto.

Okazas kunsido de la **Subtena Sektoro** (2008-08-31) kaj **ĝenerala asembleo (ĜA) de la Scienca Sektoro** (2008-09-05). Tie voĉdoni rajtas la subtenaj membroj resp. la efektivaj membroj. En la ĜA krome ĉiuj adjunktoj havas la rajton ĉeesti; asociitaj docentoj (ADoc) havas krome la parolrajton.

Vendrede je la 16-a horo okazos membrokunveno de la germana AIS-asocio *(Internationale Akademie der Wissenschaften e. V.)*.

6 Organizaj detaloj

Ĉiu interesulo rajtas aliĝi al la PSUS. Ne necesas formalaj sciencaj kvalifikoj.

6.1 Kursoj kaj kursfinaj ekzamenetoj

Ĉiu SUS-ano rajtas senpage enskribiĝi kaj partopreni kursojn (tion inkluzivas la aliĝkotizo). Kontraŭ aparta kotizo (po 0,3 AKU por unu kurso) oni ricevas oficialan partopren-ateston, ĉeestinte minimume 3/4jn, kaj noton, se oni sukcesis en la kursfina ekzameneto. La ekzameneton oni rajtas partopreni sen ĉeesti la kurson dum la sama SUS, do iamaj kursanoj povas ripeti la ekzameneton.

Ankaŭ pri kursoj ofertataj en la *instruteko* (vidu ĉapitron 7) povas okazi ekzamenetoj por studantoj, kiuj aŭtodidakte aŭ alie preparis sin.

Se studanto ekzameniĝas sen 3/4-a partopreno en kurso, li devas sukcesi minimume per la noto 7/10 por ricevi ateston.

La kursfinaj ekzamenetoj de la sciencaj kursoj okazos vendrede (09-05), se nenio alia estas anoncita dum la kursoj. La SUS-anoj, kiuj intencas akiri kurs-atestojn, enskribiĝu al la kursoj ĉe la SUS-oficejo dum la akcepto-/registriĝo-tagoj (08-30/31) aŭ anoncu sian intencon dum la unua leciono.

6.2 Prelegoj

La preleg-kunsidojn gvidas la dekanoj aŭ vicdekanoj de la koncerna sekcio, aŭ komisiitoj de ili. La partopreno en prelegoj (kontraŭe al partopreno en kunordigita preleg-serio) ne egalvaloras al kurspartopreno kaj ne rezultigas stud-unuojn.

Debutprelegojn prezentas nove alvokitaj profesoroj, *docentiĝprelegojn* estontaj plenrajtaj docentoj de AIS. La prelegoj daŭras po 40–60 minutojn, inkluzive de diskuto kaj paŭzeto. La preleglingvo estas ILo.

La sama tempo estas je dispono por *invititaj prelegoj* (en iu ajn oficiala lingvo de AIS) kaj por *projekt-akceptigaj prelegoj* (en ILo) de kandidatoj, kiuj celas estontan originalan akiron (ne adopton) de grado de AIS.

Ankaŭ liberaj ISKanoj (t. e. ISKanoj, kiuj ankoraŭ ne kiel adjunktoj aŭ efektivaj membroj apartenas al AIS) rajtas prezenti t. n. *liberajn prelegojn*, pere de la dekano de la koncerna sekcio. Ili rajtas okazi en iu ajn oficiala lingvo de AIS kaj daŭri po 25–40 minutojn.

Ankaŭ *konciz-prelegoj* (10–20 minutoj) povas okazi en ajna oficiala lingvo de AIS. Ili estas oferteblaj ankoraŭ post la starigo de la SUS-programo, tra la koncerna (vic)dekano aŭ (vic)fakarestro. Temoj de konciz-prelegoj ne listigitaj en la programkajero estos afiŝataj dum SUS laŭ la informoj transdonitaj de la prelegontoj al la SUS-oficejo. Laŭeble la prelegantoj mem pretigu du A4-foliojn afiŝeblajn.

6.3 Sekretariejo

La sekretariejo de PSUS-BA kaj la ekzamen-oficejo laboros en kursĉambro A. Tial ili funkcias nur en paŭzoj inter la kursoj kaj prelegoj. Por kontakti ilin bonvolu laŭeble uzi la unuan paŭzon inter la 10:30 kaj la 11:00, aŭ interkonsenti alian tempon kun la direktoro de la ekzamen-ofico aŭ la sekretario.

Je la sabato antaŭ PSUS, 2008-08-30, la sekretariejo estas malfermita inter 17:00 kaj 18:00.

6.4 Aliĝo

Aliĝilojn bonvolu sendi al la senata sekretario (Dr. Reinhard Fössmeier, Rahel-Straus-Weg 19, DE-81673 München, Germanio; retpoŝto informo@ais-sanmarino.org). Informoj pri la Prov-SUS troviĝas rete ĉe

`http://www.ais-sanmarino.org/arangxoj/sus/psusba`.

Studentoj kun valida studenta numero povas aliĝi neformale per simpla retmesaĝo.

Bonvolu atenti, ke aliĝoj ne estas trakteblaj sen pago de la aliĝkotizo. La kotizo ne inkluzivas ekzamenkostojn, kurskotizojn (por ricevo de atesto), kostojn por loĝado kaj manĝado. Aliĝo ne estas transdonebla.

SUS ne asekuras siajn partoprenantojn kontraŭ malsano, akcidentoj aŭ io alia. Bonvolu atenti, ke multaj malsan-asekuroj ne kovras malsanon en eksterlando. Konsilindas speciala asekuro por eksterlandaj vojaĝoj.

Pagi aliĝkotizon devas ankaŭ *kursgvidontoj* kaj *prelegontoj*; ili rericevos sian kotizon post sia kontribuo. Kurs- kaj prelegproponoj kaj aliĝoj por ekzameno estas trakteblaj nur post alveno de la SUS-aliĝkotizo.

Ĝis kvar semajnojn antaŭ la komenco de la sesio (t. e. ĝis 2008-08-02) la aliĝkotizo estas nur 0,3 AKU, poste 0,5 AKU. Kotizo por unutaga partopreno en SUS estas po 0,2 AKU. Partoprenantoj el reform-eŭropaj landoj rajtas je rabato de **75 %**. La kotizo estas pagebla laŭ jenaj vojoj (ĉiam kun indiko de la pagocelo kaj de la nomo de la aliĝanto):

- al la Germana konto 2051-305 de AIS ĉe Postbank Hannover, banko-kodo 25010030, Swift-kodo PBNKDEFF250; IBAN DE19 2501 0030 0002 0513 05, BIC: PBNKDEFF.
- al la UEA-konto de AIS: aisc-j. (Eblas kreditkarte pagi al sia UEA-konto.)
- Pro la altaj bankokostoj ni petas ne sendi ĉekojn.

ISKanoj, kies servobonhavo havas krediton de almenaŭ 0,5 AKU, povas deprenigi la kotizon de ĝi. Dumvivaj subtenaj membroj kaj studentoj kun valida studenta numero ne pagas SUS-kotizon, se ili aliĝas minimume unu monaton antaŭ la sesio; poste ili pagas 0,2 AKU.

Bildo 1: Monbileto de 20 konverteblaj markoj

6.5 Mono

Kadre de AIS kostoj kaj prezoj estas indikataj en „Akademiaj Kotiz-Unuoj“ (AKU). 1 AKU nun valoras € 65,00. Dum la prov-SUS AIS akceptas pagojn en eŭroj aŭ en konverteblaj markoj (KM), la loka valuto de Bosnio kaj Hercegovino. La konvertebla marko estas ligita al la eŭro; ĝi havas la valoron de la iama germana marko, do 1 eŭro = 1,95583 KM.

Unu konvertebla marko (KM) dividiĝas al 100 pfenigoj *(fening, Kf)*. Ekzistas apartaj monbiletoj de la du landopartoj (Serba Respubliko / Federacio Bosnio kaj Hercegovino), sed ili validas en la tuta lando. La valoroj de la monbiletoj estas 1, 5, 10, 20, 50, 100 kaj 200 KM, de la moneroj 5, 10, 20, 50 Kf kaj 1, 2 kaj 5 KM. Biletoj de 50 Kf ne plu validas.

6.6 Salonoj

Dum la prov-SUS po pluraj „virtualaj salonoj“ estas kunigitaj al unu reala salono. Por la sekci-kunsidoj la sekcioj bonvolu grupiĝi en la du salonoj aŭ interkonsenti pri iom malsamaj tempoj. Bonvolu atenti la informon pri la sekretariejo en sekcio 6.3.

La salonoj estas nomitaj honore al jenaj eminentuloj:

ARISTOTELO de Stagira, helene *Αριστοτέλης* (384–322 a. K.)
Helena filozofo, fondinto de la empiria naturscienco kadre de ampleksa empiria sistemo kondukanta de la logiko ĝis la ŝtatteorio. Liaj instruoj ĝis la fino de la mezepoko restis la fundamento de sciencaj instruado kaj esplorado. Li estis disĉiplo de Platono kaj instruisto de Aleksandro la Granda.

Georges BOULANGER (1909–1982)
Fondinto (en 1957) de *Association Internationale de Cybernétique* (Namur, BE) kaj ties prezidanto ĝis sia morto; en 1980 enkondukis en tiun asocion ILon kiel trian laborlingvon, eklerninte ĝin kiel

70-jarulo. Vicprezidanto de Eŭropa Klubo kaj membro de ties iniciat-grupo AIS.

René DESCARTES, Latine: Renatus Cartesius, ILe: Kartezio (1596–1650)
„La patro de la moderna filozofio“, kiel oni ofte nomas lin, provis ligi filozofion al la natursciencoj aplikante al ambaŭ racian metodon. Sian mekanikan mondkoncepton li aplikis eĉ en psikologio. Li skizis ankaŭ principojn de planlingvo en sia letero de la 20-a de novembro 1629 al la benediktana scienculo *Mersenne*.

EŬKLIDO de Aleksandrio (*Ευκλεῖδες*) (ĉ. 365–ĉ. 300 a. K.)
Helena matematikisto kaj naturesploristo, kiu laboris sub Ptolemeo (Ptolemaios) la 1-a ĉe la „Museion“ en Aleksandrio. Lia plej fama verko estas la libro „Elementoj“, aksioma prezento de la tutaj tiamaj geometrio kaj aritmetiko. Krome li verkis manlibron „Geometria optiko“ kaj aliajn traktaĵojn pri planimetrio, sfero kaj matematika muzikteorio.

Galileo GALILEI, ILe: Galilejo (1564–1642)
Kvankam liaj ideoj troviĝas kadre de la kristana mondkoncepto, la Itallingva natursciencisto konfliktis kun la katolika eklezio pro sia verko pri la galaksi-modeloj, en kiu li argumentas por nova, kies centro estas la suno. Kiel unu el la unuaj sciencistoj li verkis ne plu en la Latina lingvo, nekomprenata de vasta publiko.

Mohandas Karamchand GANDHI / मोहनदास करमचन्द गांधी (1869–1948)
Hinda politikisto, kiu proklamis senbatalilan ribelon kontraŭ la okupadaj trupoj, per manŝpinado kontraŭ la teksaj fabrikoj de Britio, per „salmarŝo“ kontraŭ la brita salmonopolo, per reiro al simpla natura vivoformo, por formi sendependan komunan ŝtaton de hinduoj kaj islamanoj. Li subtenis la ideon de la Internacia Lingvo, kunlaborante kun la svisa sciencisto *Edmond Privat*.

Jan Amos KOMENSKÝ, Latine: Iohannes Amos Comenius. ILe: Komenio (1592–1670)
La fondinto de la moderna pedagogio ne nur teorie, sen ankaŭ praktike kontribuis al sia fako, i.a. per facila lingvoinstrua legolibro. Li proponis la enkondukon de planlingvo kaj la starigon de internacia akademio de la sciencoj.

Giuseppe PEANO (1852–1932)
La Itala matematikisto interalie starigis sistemon por aksioma difino de la naturaj nombroj. En 1903 li prezentis planlingvan projekton de simpligita Latino, nomatan „*Latino sine flexione*“; en tiu lingvo li eldonis sian verkon *Formulario Mathematico*. Ekde 1909 li estis prezidanto de la planlingva akademio *Academia pro Interlingua*.

Hermann SCHMIDT (1894–1968)
Jam en la jaro 1941 la Germana fizikisto kaj regulad-teknikisto prezentis la bazajn principojn de kibernetiko. Ekde ĉ. 1962 li pli kaj pli influis la filozofion de klerig-kibernetiko kaj de aliaj antropokibernetikaj brancoj.

7 Instruteko

Dum PSUS-BA eblas akiri studunojn ankaŭ surbaze de memstara studado de kursoj el la instruteko de AIS, se la kandidato sukcesas en kursfina ekzameno per noto de minimume 7/10. La ekzameno povas okazi dum PSUS-BA, se la kandidato sciigas sian deziron kun indiko de la elektita(j) kurso(j) plej malfrue **ses semajnojn** antaŭ la malfermo de PSUS-BA (2008-07-20) al la ekzamen- kaj klerigofico (OProf. H. D. Quednau, Forstwissenschaftliche Fakultät, Am Hochanger 13, DE-85354 Freising).

Superrigardo pri la Interretaj kursoj de AIS troviĝas ĉe `http://www.ais-sanmarino.org/klerigofico/virt.html`. Sed ne ĉiuj tiuj kursoj estas disponeblaj por ekzameno dum PSUS-BA. Ĉe intereso bonvolu informiĝi ĉe la klerigofico.

8 Pri Banjaluko

8.1 Situo kaj sciindaĵoj

La lando Bosnio kaj Hercegovino konsistas el du partoj; la Federacio Bosnio kaj Hercegovino kaj la Serba Respubliko. Banjaluko estas la ĉefloko de la Serba Respubliko, kiu konsistas el du partoj, norda kaj orienta. Banjaluko situas okcidente en la norda parto, en la valo de rivero *Vrbas*.

La Serba Respubliko havas tri oficialajn lingvojn: la bosnian, la kroatan kaj la serban (en alfabeta sinsekvo). Ĉiuj tri estas slavaj lingvoj kaj iom similaj; iam ili havis la komunan nomon „serbo-kroata lingvo“. La du unuajn oni skribas per latinaj, la trian ofte per cirilaj literoj. La retejo de urbo Banjaluko, same kiel aliaj tiulandaj, tial distingas ne inter lingvoj, sed inter alfabetoj: Eblas elekti inter „Ћирилица“ (Ĉirilica) kaj „Latinica“.



Bildo 2: Situo de la Universitata Centro

SUS-ejo. La SUS-programo en Banjaluko okazas en la Universitata Centro, kiu situas oriente de la urbocentro, sude de la stacidomo, sur la maldekstra (okcidenta) bordo de rivero Vrbas. Ĝia adreso estas: Bulevar Vojvode Petra Bojovića 1a. Kursoj okazos en la sporta fakultato (K) en la skizo). Detaloj estas ekscieblaj el skriba anonco ĉe la enirejo (E).

Loĝado. Por SUS-anoj estas disponeblaj kelkaj ĉambroj en studenta domo (S), kiu situas sur la universitata tereno. La ĉambroj estas trilitaj, po du havas komunan banejon. Interesuloj bonvolu turniĝi al EProf. Preradović (ljubopr@yahoo.com). La prezo de unu nokto estas proksimume 5 eŭroj, tiu de plena pensiono proksimume 15 eŭroj.



Banjaluko disponas pri multaj hoteloj, kiuj parte informas kaj estas mendeblaj tra la Interreto.

Klimato. Banjaluko situas je latitudo de 44°46', proksimume kiel Bukareŝto, Beogrado, Parma, Bordozo. Ĝia alto super marnivelo estas 163 m.

La vetero komence de septembro kutime estas varma kaj suna; la tempo de julio ĝis mezo de septembro estas la malplej pluva. La meza pluvkvanto por tuta septembro estas 69 mm. La meza temperaturo en septembro estas 17,1 °C, la tagaj minimumo kaj maksimumo estas ĉ. 5–7 K sub resp. super tiu valoro.

Alvojaĝo. Banjaluko havas internacian flughavenon, fervojan kaj aŭtobusan stacidomojn. Flugaj ligoj ekzistas interalie kun Zuriko (Svislando) kaj Salcburgo (Aŭstrio).

La busaj konektoj ĝenerale estas pli oftaj kaj pli rapidaj ol la fervojaj. La fervoja kaj la busa stacidomoj situas en la norda parto de la urbo, ĉ. tri kilometrojn de la urbocentro, ĉ. du de la universitato. Vojaĝante per busoj de *Touring Eurolines* necesas fari rezervadon por la revojaĝo (laŭ informo de la firmao). Tio eblas ĉe agentejo *Bakić Reisen, Braće Mažar 6* en Banjaluko.

Бања Лука

Eksterlandaj aŭtoveturantoj bonvolu atenti, ke vojaj ŝildoj en la Serba Respubliko ofte uzas nur la cirilan alfabeton.

Telefonado. La internacia antaŭnumero de Bosnio kaj Hercegovino estas **+387** (Banjaluko: +387-51). Por konekto alilanden ciferumu **00**.

Publikaj telefonoj en la Serba Respubliko estas mastrumataj de firmao Телекард (telekard), subfirmao de Telekomunikacije RS. Ĝi vendas telefonkartojn je 5, 10 kaj 20 KM (150 / 350 / 750 unuoj), haveblajn ekzemple en poŝtejoj. La 20-marka karto permesas telefonadon de ĉ. 15 minutoj al proksimaj landoj aŭ de ĉ. 12 minutoj al cetera Eŭropo.

Ĉar Bosnio kaj Hercegovino ne estas membro de Eŭropa Unio, poŝtelefonaj vokoj al eksterlando kutime kostas konsiderinde pli ol ene de EU. Tio validas ankaŭ por alvenantaj vokoj ricevitaj el EU-landoj.

La informojn ni donas sen garantio.

8.2 Retaj informoj

Pli detalajn informojn pri Bosnio kaj Hercegovino kaj pri Banjaluko en Esperanto donas Vikipedio (al kiu AIS regule kontribuas):

`eo.wikipedia.org/wiki/Banjaluko`
`eo.wikipedia.org/wiki/Bosnio kaj Hercegovino`
`eo.wikipedia.org/wiki/Serba Respubliko`
`wikitravel.org/eo/Banjaluko`

Kelkaj utilaj esprimoj en la serba lingvo

Prononco: č → ĉ, h → ĥ, š → ŝ, ž → ĵ, au → aŭ

	Serbe, latina skribo	Cirila skribo
Bonan matenon!	Dobro jutro!	
Bonan tagon!	Dobar dan!	
Bonan vesperon!	Dobro veče!	
Ĝis revido!	Do videnja!	
Pardonu!	Izvinite!	
Mi petas vin	Molim vas	
Dankon	Hvala!	
Ne dankinde!	Molim!	
Mi ŝatus	Volio bih	
Ni ŝatus	Voljeli bismo	
– trinki ion	– nečto (po)piti	
– malgrandan bieron	– malo pivo	
– du grandajn bierojn	– dva (velika) piva	
– la menukarton	– jelovnik	
– telefonkarton	– telefonsku karticu	
La fakturon mi petas	Molim fakturu (račun)	
Necesejo	Toalet	Тоалет
– por virinoj	– ženski	женски
– por viroj	– mužki	мужки
Kie estas...	Gdje je	
– la stacidomo	– željeznička stanica	
– hotelo	– hotel	
– la bushaltejo	– autobuska stanica	

Tabela programo de la ProvSUS

	sal.	A 9:00–10:30	B 11:00–12:30	M	C 14:00–15:30	D 16:00–17:30	V vespere
sab 08-30						17–18 sekretariejo	
dim 08-31	B Bou					16.00 SubS 17.00 Inaŭguro	
lun 09-01	A B	 M2 Preradović	N1 Quednau M3 Leonov		K1 Fössmeier M1 Lewand.-Q.	Rigardado de Banjaluko	
mar 09-02	A B	 M2 Preradović	N1 Quednau M3 Leonov		K1 Fössmeier M1 Lewand.-Q.	K-p1 M-p1, H-p1	sekci- kunsidoj
mer 09-03	A B Bou	 M2 Preradović	N1 Quednau M3 Leonov		K1 Fössmeier M1 Lewand.-Q.	 M3 Leonov Ronda Tablo	Akademia Forumo (B)
ĵaŭ 09-04	A B	 M2 Preradović	N1 Quednau	ekskurso al Krupa na Vrbasu			
ven 09-05	A B	K1 Fössmeier M1 Lewand.-Q.	F-p1 K-p2		Kursfinaj ekzamenetoj	16:00 AIS-D 17:00 Ĝ. A.	
sab 09-06		Publikaj finekzamenoj				 solena fermo	
dim		foriro					

Salonoj

Alordigo inter virtualaj kaj realaj salonoj			
Virtuala salono	Reala salono	Celo	
Boulanger	Akad. pri Artoj	inaŭguro	Komparu la klarigojn en ĉapitro 6.6
Schmidt	A	Sekcio 1 (kibernetiko)	
Komenský	B	Sekcio 2 (homsciencoj)	
Peano-Eŭklido	A	Sekcio 3 (strukturSciencoj)	
Descartes	B	Sekcio 4 (filozofio)	
Galileo	A	Sekcio 5 (natursciencoj)	
Aristotelo-Gandhi	B	Sekcio 6 (morfosciencoj)	

Kalendareto								
	lu	ma	me	ĵa	ve	sa	di	
aŭg	25	26	27	28	29	30	**31**	aŭg
sep	**1**	**2**	**3**	**4**	**5**	**6**	7	sep
	8	9	10	11	12	13	14	